## Brakhorloĝa kompaso

Onidire ja okazas, ke, senzorge migrante, oni perdas la orientiĝon kaj hazarde ne kunportis kompason. Se brilas la suno, brakhorloĝo kun montriloj estas tre helpa. Enmetu bastoneton rekte en la grundon – ĝi ĵetas ombrostrion. Metu nun vian brakhorloĝon apude sur la teron kaj ordigu ĝin tiel, ke la hor-montrilo paralelas la ombrostrion. Kaj nun determinu la mezon de la angulo inter la hormontrilo kaj la 12-hor-marko de la horloĝo. La anguldunono indikas la nord-sudan linion (la suno estas sude). Se hazarde estas "somera tempo", oni devas preni la anguldunonon inter la hormontrilo kaj la 13-a horo. Se vi survojas sur la suda duonglobo, direktu la 12-hor-markon laŭlonge de la ombrostrio kaj prenu la anguldunonon de la aktuala hormontrila pozicio. Kiel la homoj en la suda hemisfero traktas pri somera kaj vintra tempo – nu, mi ne scias... (2007-08-01)

## Kalkulu denove!

En la jaro 1979, la Monda Naturprotekta Unio (IUCN) sendis demandilojn al naturprotektantoj, esploristoj kaj bestkonantoj por registri la elefant-populaciojn de la tuta mondo. La enketo rezultigis 1,3 milionojn da afrikaj elefantoj. Dek jarojn poste, alia spertulogrupo ripetis la nombradon. Kaj jen – ekzistis nur la duono, nome 25 000 de tiuj dikhaŭtuloj. La ceteraj, tiel oni supozis, estis en tempoperido de 10 jaroj kruele buĉitaj de senskrupulaj eburokolektantoj. La homoj en la tuta mondo – kaj la komunikadaj instancoj – subite estis sku-vekitaj: gazetoj kaj televidiloj plenis pro kortuŝaj bildoj de mortigitaj elefantoj kaj neleĝe akirita eburo. Sekvis internaciaj konferencoj, ĉasmalpermesoj, malpermeso por eksport-importo kaj vendado de eburo. Kaj tiel evoluis la afero... Por kontrol-reviziado pri la kaŭzo de la duoniĝo de la tutmonda elefantpopulacio, kelkaj sciencistoj en 1979 denove pristudis la demandilojn kaj enketoformularojn kaj jam baldaŭ trafis suspektajn dubindaĵojn. En Niĝerio tiam ekzistis forta sekeco – kaj oni pro tio ne tiom grava konsideris la elefantnombradon. En 19 el 35 landoj ekzistis nur unusola – nekontrolebla – datumfonto, kelkaj observantoj nombris malsisteme kaj senskrupule, iu nombranto laboris samtempe por 5 landoj. La nombrokorektoj, kiuj estis faritaj surbaze de la revizi-kontrolado, ne plu aperis en la mondaj gazetaroj sed nur en fakrevuaj publikigaĵoj. Centmiloj da elefantoj, kiuj neniam ekzistis, estis priploritaj kaj donace savitaj. Intertempe en Sudafriko eĉ ekzistas regionaj elefant-trolоĝatecoj. La lokaj bestprotektantoj pledas por kontrolata pafmortigo des pli multe, ĉar oni urĝe bezonas la monon el la viando- kaj eburvendado por realigi aliajn bestoprotektprogramojn. Sed tiuspeca pledo – post la antaŭa historio – certe nur malfacile gajnos ĝeneralan akcepton. (2007-06-25)



## Ladskatolaj kolbasetoj

Ekde 1883 *Friedrich Heine* (1864-1929) jam fumaĵis kolbasetojn kaj vendis ilin en *Halberstadt*, Germanujo. Nun estis alveninta lia granda festotagoŝanco: imperiestro Vilhelmo la 2-a kun akompantanaro, honorgastoj kaj miloj da spektantoj venis por inaŭguri la proksiman *Kyffhäuser*-monumenton je la 28-a de junio 1893. Kaj al *Heine* estis permesate kontribui la kolbasetojn – 40 000 parojn li liveris! Sed la "veterdio" – aŭ iu ajn alia sanktulo – ne estis tre bonintenca al li, kaj la festotago finiĝis antaŭtempe pro ŝtormo kaj pluvego. Kion fari per tiom da kolbasetoj? Frederiko *Heine* riskis ĉion kaj realigis multjarajn anataŭigajn provojn: li enskatoligis la kolbasetojn en ladskatolojn kaj tiumaniere savis 30 000 da ili. Kelkajn semajnojn poste li prezentis la mond-novaĵon "Kolbasetoj en ladskatoloj" je la Kuir-arta Ekspozicio en *Wiesbaden*, Germanujo. Kiam Frederiko mortis, li provizis 60 000 klientojn sur ĉiuj 5 kontinentoj. Cetere – dum sia ĉirkaŭmonda navigado la granda fanfaronulo kaj maroficiro *Felix Graf Luckner* mortigis ŝarkon, en kies stomako troviĝis skatolo de "*Heine*-kolbasetoj el *Halberstadt*"... (2007-06-28)

## La "Bazela kolombeto" – ĉu dolĉaĵo?

Filatelistoj certe ekridas ĉe tiu ĉi demando, ĉar ili bone konas la svislandan "Bluan Maŭriciaĵon" kiel raraĵon kaj kuriozaĵon. Sian nomon tiu ĉi poŝtmarko ricevis pro sia ĉefmotivo: ekfluganta kolombo kun letero en la beko. La Bazela kolombeto estis emisiita valore de 2½ rapoj (tiama svisa monero) de la Bazelurba Kantono. Ĝia presado montras kelkajn apartaĵojn: unue ĝi estas la unua poŝtmarko presita en Germanio (Frankfurto ĉe Majno); due ĝi estas la unua poŝtmarko en la mondo presita laŭ trikolorpresado (nigra/ruĝa/blua); trie ĝi estas konata ekzemplo por kombinita libropresado kaj stampado, ĉar la leterportanta kolombo estas presita kiel senkolora reliefo. Por la *Tybli* (svislingve: kolombo) oni devas nuntempe surtabligi pli ol 10 000 eŭrojn. (2007-07-30)

## Neblua blua planedo

Ekde ĉ. unu jardeko oni diskutas en la scienco la ideon pri "neĝbula Tero", ĉar oni estas trovinta mondvaste la spurojn de glaĉeraj sedimentoj el la prekambrio, la frutempo de la Tero. Multaj el ili sedimentiĝis malpli ol 10 latitudojn for de la ekvatoro. Laŭ la neĝbul-Ter-tezo, antaŭ 700 ĝis 580 milionoj da jaroj, do en la malfrua kambrio, okazis eble kvar multampleksaj glaciaj epokoj dum kiuj la polusa glacio etendiĝis ĝis tropikaj latitudoj. Sekve la Tero estis tute glaciiĝinta. Sed kio pri la maraj vivaĵoj? Surtere ja tiam vivo ankoraŭ ne ekzistis, sed svarmis multege da mikroorganismoj en la maroj, kaj laŭ unuaj taksadoj la surtera glaciotavolo estis ĉe mondvastaj minus 50° C ĝis 1 km dika.